

La Esperanto-Gironde Informilo



JANUARO 2025

N° 177



Feliĉan Novan Jaron!

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

la 15an de septembro 2024

de la 10a 30 ĝis la 16a30

Ĉeestas: Ĵanseb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Pascal Engelibert, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Dominiko Martins, Klodin' Pomiro, Marcelo Redoulez, Eric Tiffon, Bernardo kaj Rose Sarlandie.

Senkulpigitaj: Joël Lajus, Olivier Moreno

Elvezio bonvenigas al ĉiuj.

1. Partopreno en la forumo de la socioj en Pesako

Elvezio: Pluraj anoj de Esperanto-Gironde ĉeestis. Oni kunkantis la himnon.

Vizitis la budon kelkaj homoj, interalie Sro Rousset. Espéranto-Gironde unuafoje partoprenis en la forumo. La loko estis bone videbla. Venis homoj, kiuj jam konis eĉ jam lernis Esperanton. Kelkaj eble venos al la kurso. La grupo disdonis broŝuretojn de Espéranto-France. Venis ankaŭ radioamatoro, kiu sciis pri Esperanto, kaj unu virino aĉetis lernolibron.

Yannick: Estis budo en Montendre. Kelkaj homoj scivolis, du personoj ŝajne interesiĝis kaj unu alia mendis la brasensan libron.

2. Kurso en la universitato

Ĉeestas novaj kaj malnovaj lernantoj.

3. Kontakto de grava Esperantisto

Elvezio: Seán Ó Riain, irlanda diplomato translokiĝis en Parentis, lia edzino estas franca. Li serĉas Esperanto-klubon. Clément, kiu loĝas en Biscarosse, povos proponi renkonton. Seán Ó Riain verkis plurajn librojn en la angla pri la lingvaj politikoj en Eŭropa Unio. Elvezio sendos al li la lastan LEGI. Dominiko lin aldonis en la retejo.



Dominiko:

Pri la Grajneto: Okazis renkontiĝo la 26an de aŭgusto pri libereco de lingvo, mono ktp.

La venonta okazos la 19an de septembro.

Klodin': Kunportis materialon por la Grajneto: reuzeblajn glasojn, kalendaretojn, flugfoliojn.

4. Pri Brassens

Marcelo: Rekontaktos la presiston. La problemo pri la tajparo ne ankoraŭ estas solvita. Necesos repreni la antaŭan version kaj ĝin aktualigi.

SAT esploras pri nova eldonejo, do ni povos kompari la prezojn.

5. Aliaj aferoj

Klodin': Du LEGLI poŝte senditaj revenis. Do restas nun 5 adresoj kaj Martine.

Luca: Pri la forumo: Ne multaj homoj sed ili montris sin interesatoj pri Esperanto kaj la asocio. Iu ĵurnalisto venis kaj demandis pri la kursoj en la universitato.

Elvezio: Rezervis la salonon por la 8a de decembro por Christian Leduc.

Marcelo: Ni profitos la okazon por festi la Zamenhof-tagon. Christian Leduc estos disponebla. Okazos unue la kunveno kaj poste la koncerto.

Klodin': Ĉu malfermi la koncerton al ne-Esperantistoj ? Se jes, en kiu loko ?

Bernardo: Eble estos pli bone rezervi pli grandan salonon.

Dominiko: Oni povus fari tiun koncerton kun la asocio de la Grajneto, kiu havas multajn membrojn.

Marcelo: Ni devas informiĝi pri la financaj kondiĉoj por la uzado de alia salono. La koncerto okazos je la 15a.

Luca: Malĉeestos dum 6-12 monatoj, restados en Potsdamo por prepari memuaron.

Dum la somero, uzis la pasportan servon por dormi en Monzo apud Milano kaj poste invitis sian gastiginton en Bordojo.

Marcelo vizitis Vitorion, uzante la pasportan servon. Li kontaktis Aŭstralianinon, kiu tie loĝas de pluraj jaroj kaj instruas la kimrian lingvon, Deborah Mc Carny. Li renkontis Naĉo-n, kiun li ekkonis en 1992, okaze de la ĝemeliĝo inter Espéranto-Gironde kaj la Eŭska Esperanto-Grupo. Pluraj anoj de la eŭska grupo



opinias, ke la du grupoj povus renkontiĝi en iu loko. Onta renkonto povus okazi en Saint-Palais, apud Saint-Jean-Pied-de-Port, ĉe Marie Savary (granda salono povas akcepti dormosakojn). Liven Dek pretus partopreni en renkonto en San Sebastian.

Elvezio: Vizitis la Nacian Muzeon de Esperanto en Gray. La filino de Géo Junier akceptis lin. Ŝi estas sola por ĉion prizorgi. Estas projekto por renovigi la konstruaĵon, en kiu sidas la muzeo, kaj fari loĝejojn. Do kio fariĝos la muzeo ? Grava problemo: ne ekzistas datumaro pri kio kuŝas en la muzeo.

Katya: Kongreso en Oporto. Estis multaj homoj, kaj tre riĉa programo. Estis proponitaj ekskursoj per tramo aŭ buso, ĉiutage. Ŝi vizitis la Marmuzeon.

La venontaj kongresoj okazos en Ĉeĥio:
Brno (UEA)
Svitavy, apud Brno, la antaŭan semajnon (SAT)

Marcelo: Dum la SAT-kongreso en Oporto, prelegis pri Aristides de Souza Mendes, kaj pri «Kiel franca ŝlagro de Polnareff iĝis ribela kanzono en Koreio».

La ĉeestantoj estis tre interesataj.

Dum la kongreso okazis aliaj prelegoj pri diversaj temoj.



Klodin': Ni vizitis parton de kazino, kiu estis torturejo de la politika polico PIDE dum la diktatoreco. Ĉiĉeronis maljuna virino, kiu siatempe suferis torturojn en tiu loko. Tre emocia vizito.

La venontaj kunvenoj okazos la 13an de oktobro kaj la 10an de novembro.

La kunveno finiĝas je la 12a30.

Post la manĝo:

- Kunkantado de rezistaj kantoj, kiuj estis kantitaj dum la kongreso.

- Bildaro pri Portugalio: «Surprizo ĉe la fino de la tero». Ses bildoj por kolektive retrovi kaj rakonti, kiu estas tiu memoraĵo. Tiu evento okazis je la Kabo Finistero, kie staras statuo de ŝuo, kiu indikas la kilometron «nul» de la jakoba pilgrimvojo.

Sur unu bildo, panelo atentigas pri la ebla ĉeesto de soldelfeno, kiu loĝas de 2017 en la proksimaĵo. Estas malpermesite alproksimiĝi al ĝi, ĝin tuŝi aŭ nutri.

Fakte sur finaj bildoj, oni vidas la delfenon, kiu mem alproksimiĝas al banantoj, ludas kun ili...

Estis tre emocia spektaklo.

Raportis Janine

NIAJ KURSOJ

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono G-207, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

- En **SAINT-GENÈS DE LOUBÈS**, nun la kursoj okazas laŭ nedifinita horaro, ĉar ni estas tre malmultaj, kaj inter ni estas infanoj. La sekva kurso okazos sabaton la 23-an de marto je la 10a15, ĉe Jean-François kaj Iberla, kun Klodin' kaj Marcelo. Se estos aliaj homoj, ni disponos pri komunuma ĉambro.

Por informiĝi: gemesperanto@gmail.com aŭ 06 60 18 28 66.

97a kongreso de SAT en Oporto

5-11 aŭgusto 2024 – *personaj impresoj de Marcelo*

Vivoplena kongreso kolorigita de diantoj!



Kiel ŝatas mi tiujn kongresojn, kie ni povas libere, senĝene diskuti kun ĉiuj ĉeestantoj. Kaj ne nur respondante al ekkonaj demandoj: Kie vi loĝas? Kiam vi eklernis Esperanton? La diskutoj rilatas al la vivkondiĉoj de la homoj, al iliaj ŝatokupoj, pasioj. Malmult-nombra ĉeestanta-

taro signifas, ke ni facile kontaktas ĉiujn ajn. Rapide, malferme.

Mi salutas la T-ĉemizon de Deborah kaj Luigi, itala paro: ili ambaŭ alvenis en la komfortan tute adekvatan, (eĉ iel luksan) kongresejan salesanejon¹ surportante diklitere «Dank' al Dio estas mi ateisto!»

La riĉa programo estis konstruita, tiel ke neniu cetera programero okazis, nek dum la laborkunsidoj de SAT, nek dum la ekskursoj. Jen novaĵo, incite al partopreno en la kunsidoj kaj al grupaj vizitoj. Kaj tiel la partoprenintoj, kvazaŭ ĉiuj, samgrupe vizitis la proponitajn ekskursojn.

Fakte mi konscias, ke verŝajne unuafoje dum kongreso mi partoprenas en ĉiuj duon-tagaj kaj tuttaga ekskursoj!

La ekskursoj

Unue mi salutas la grandan kvaliton de la komentoj kaj de la tradukoj, fare de Ŝana, Roger kaj Vesperto, la ĉefaj kongresorganizantoj, dank' al kiuj la tuta grupo ĝuis tre interesajn vizitojn en la muzeoj kaj laŭ la stratoj.



Ekskarbominejon, marmuzeon kaj salmarĉojn mi jam vizitis en Francio. Tamen la vizititaj lokoj aldonis lokajn portugalajn aspektojn kaj praktikojn. Kaj laŭ mi, plej trafe dum tiuj vizitoj, pli ol la lokoj kaj la ekspozicioj mem, menciendas la diskutoj kun maljunaj atestantoj de iamaj travivaĵoj. Ekzemple kun Maria

José Ribeiro, kiu suferis enkarcerigon kaj torturojn en la politika malliberejo. Alia ekzemplo, la tre amuza, kantema emerito, kiu en la marmuzeo de Ilhavo rakontis pri la danĝera vivo de maristoj, moru-kaptistoj.

¹ Salesanoj estas romkatolika ordeno; tial en ĉiu dormĉambro pendis Kristo.

Naŭze ŝoka vizito: Merkredon posttagmeze ni partoprenis la ekskurson al «la iama politika prizono de Oporto». La grupa aliro per la metroo denove pruvas la bonan etoson inter kongresanoj. Ĉe la elira stacio «Heroismo» troviĝas la placo kun bronza busto de Viriginia Moura, heroa revolucia virino. De tie ekmarŝas ĉiu manifestacio en Oporto.



Sed surprizoj baldaŭ trafos min: la nomita «prizono» estas nun muzeo de la armeo! Kaj apenaŭ ni eniras en la korton: ŝoko! Tie infanoj malpli ol dekjaraj estas kostumitaj kaj ŝminkitaj kiel soldatoj dum milito kaj juna bazgradulo instruas al ili parade marŝi, laŭtkriante siajn severajn ordonojn! Eĉ humiligante iom tro fantazieme ridantan knabeton. Min jam naŭzas, kion mi vidas. Diversaj kanonoj staras sur la korto, min naŭzas tiu loko.



Finfine venas interesa renkonto. La viziton gvidas Maria José Ribeiro, maljunulino, kiu raportas proprajn spertojn pri torturoj en tiu iama prizono de la politika polico. Ŝia atesto valorigas la viziton. Admirinde ŝi rakontas pri la punĉeloj, la torturĉambroj kaj la fenestro je la tria etaĝo rigarde al la apuda tombejo kiel lasta averto por torturitoj. Plurfoje ŝi estis tie

enkarcerigita sed spite, daŭre aktivadis.

Sed post ŝia interveno mi ne sekvas la grupon por la daŭrigo de la vizito. Kvazaŭ sufokigita mi bezonas aeron. Ne nur mi fakte sentas la samon. Kelkaj aliaj, kaj inter la unuaj Klodin', iom post iom kuniĝos ekstere. Kaj atendante la grupon, en la korto mi kiel eble plej laŭte kantadas la kanzonojn de la rezistokantojn. *La dizertonto* k.a.. Ankaŭ Karmela kun Klodin' kantas siaflanke de la korto.

La prelegoj

Kiel la debatoj dum la laborkunsidoj de la asocio, la socie kaj politike engaĝitan SATanaron reliefigas la temojn de la proponitaj prelegoj. Ili abundis, tial pluraj estis programitaj samtempe kaj do la kongresanoj plurfoje devis elekti laŭ siaj preferoj inter pluraj eblecoj: *Laborista movado en Palestino* (en la angla kun elstara traduko de Christopher), *Historio de Oporto* (Ŝana el Oporto), *Ĉifrovaluto* (Jorge kaj Oleg), *No basaran* (komuna uzado de pura akvo) (Gi el Roŝelo), *Jeanne Deroin, voĉo de subpremitoj, vivo, revolucio kaj ekzilo* (kun traduko de Kani el la hispana), *Beleco de Ukrainio* (Katja el Kijivo), *Monda revolucio danke al neŭrosciencoj* (Virgine el Burgonjo), *Filmoj pri S. Pedro da Cova minista muzeo* (Rui el Oporto), *Evoluo de surstrata movado en Madrido* (Pako el Leono), *Prezento de la libro Volontuloj kun okulvitroj* (Kani el Don Benito).

Vi facile komprenos, ke mi aparte raportas pri la du prelegojn, kiujn mi kunpreparis kaj kunprezentis. Membroj de Esperanto-Gironde jam spektis la enhavon de la prelegoj pri la Maja Kanto, aŭ kiel franca ŝlagro iĝis himno por rezisto en Koreio kaj pri Aristides de Sousa Mendes, nefama heroo. Tamen la duvoĉaj kunprezentadoj en Oporto estas nekompareblaj. Unue ĉar la ĉeesto de Haesim PARK aldonis aŭtentan pravigon. Ŝiaj aldonitaj bildoj kaj klarigoj, ŝia forta emocio, kiu larmigis ŝin dum la prezento, aplaŭdigis la publikon. Ĉies postaj, favoraj komentoj kaj dankoj ankaŭ kortuŝis. Neniu kongresano antaŭe aŭdis pri tiu grava evento de la masakro de Ĝuangŭ la 18an de majo 1980. Due ĉar kun Klodin' ni sukcesis vekti fortan intereson i.a. de la portugalaĵ esperantistoj, kiuj volonte debatis alportante siajn personajn atestojn. Mi deziras dankegi al Haesim kaj Klodin', kiuj konsentis tiuokaze, ke mi staru apud ili fronte al la ĉeestintoj.



Talenta Ana Ribeiro kantigis la kongresanaron



En 2024 Portugalio honoris la 50an datrevenon de la 25a de aprilo de 1974, la revolucio de la diantoj. Speciala vespero estis dediĉita al tiutema prelego prezentita de Ana Ribeiro kaj Pedro Baranita. Gratulojn al tiuj du komencantoj pro ilia historia prezento, krome ilustrita de kanzonoj, kiuj grave rolis dum la revolucio:

Grandola, urbeto bruna kaj *Himno al Kaksiaso*. Tiujn kantojn volontuloj ĥore

ekzerciĝis dum la semajno kadre de tri kantatelieroj animataj de Ana. Tiel ni kunkantis ilin. Tiuj rezistokantoj troviĝis ankaŭ en la programo de la lasta vespero. Tiam unuaparte ni ĝuis majstran klasikan koncerton de Eduardo Baltar Soares per portugala gitaro, simila al mandolino laŭ la formo, kun duoblaj kordoj. Kaj dua- parte la kantateliero kantigis la kongresanaron per kantoj elektitaj el la rezistokan- tareto, kiun ĉiu trovis en sia kongressako. Tiel fervora etoso konkludis tiun engaĝitan kongreson per *Libera la pens'*, *Himno al Kaksiaso*, *La paliso*, *Unuiĝanta popolo neniam estos venkata*, *Ho belulin' ĝis*, *La maja kanto*, kaj bise *La Internacio*. Filmetoj pri tiuj kantoj rete spekteblas ĉe:

[https://youtube.com/playlist?](https://youtube.com/playlist?list=PLe7w5EDrJN4IC37Vs0pdDyMqG37KQxiR0&feature=shared)

[list=PLe7w5EDrJN4IC37Vs0pdDyMqG37KQxiR0&feature=shared](https://youtube.com/playlist?list=PLe7w5EDrJN4IC37Vs0pdDyMqG37KQxiR0&feature=shared)



Sed post la komuna vespero, noktemuloj plu kantadis ĉirkaŭ la gitaro de Ana. Ni ne volis, ke jam finiĝu tiu bela kongreso de la diantoj.



**Ek al la 98a SAT-kongreso en Svitavy en Ĉeĥio
12-19 julio 2025!**

Esperanto Gironde en la forumo de la asocioj en Pesako



Sabaton, la 7an de septembro de 2024, nia asocio partoprenis unuafoje al la jara pesaka forumo de la urbaj asocioj. La manifestacio okazis en la “Parc Razon”, la centra parko de la urbo. 180 asocioj sin prezentis al la publiko.

La vetero estis sufiĉe bona dum la tuta tago, kaj nia budo estis situata en tre bona loko, proksime de la ĉefa enirejo.

Ni komencis je la 10a matene, post la instalado de la «barnumo» de Jean Seb (dankegon al li!). La urbodomo disponigis nur po nur unu tablon kaj du seĝojn al ĉiu asocio. Dominiko kunportis la banderolon de E-Gironde kiun ni alkroĉis al la barnumo, malantaŭ la tablo, kaj je la flanko de la budo ni starigis la flamflagon, bone videbla dank’ al la venteto. Ni metis sur la tablon librojn, bildstrojn, ludojn, broŝurojn, kalendaretojn, ktp.

Dominiko kaj Eriko deĵoris matene, krome mi kaj Jean Seb. Postageze, Luka kaj Olivier anstataŭis ilin. Entute 6 homoj deĵoris en nia budo. Des pli rimarkinde, ke la saman tagon okazis aliaj asociaj forumoj kaj manifestacio. Dankegon al ili!

Nia budo allogis plurajn homojn, ne nur scivolemulojn. Ankaŭ venis iuj kiuj iam eklernis Esperanton, tamen delonge ne plu praktikas la lingvon; aliaj petis informojn pri la lingvo, kaj ni disdonis plurajn broŝurojn de E-France, kun nia adreso dorse. Aparte kortuŝa estis la vizito de intruistino de infanlernejo, kiu tute miris ĉar ĝuste pasintan semajnon ŝiaj lernantoj demandis al ŝi, ĉu ekzistas universala komuna lingvo, kaj ŝi parolis al ili pri Esperanto. Ankaŭ venis radioamatoro, kaj li paroladis pri siaj spertoj en la komunikado en komuna lingvo (morse kaj Esperanto) tra la tuta mondo.

Postageze, vizitis nian budon ankaŭ la prezidanto de la Regiono Nova Akvitanio, Sro Alain Rousset. Li rigardis kelkajn librojn, kaj foliumis unu el la du albumoj de Tinĉjo.

Je la 17a finiĝis la manifestacio per la parolado de la urbestro de Pesako kaj la urbo ofertis aperitivan al ĉiuj deĵorintoj.

Estis do vere bona okazo prezenti nian lingvon kaj varbi: espereble kelkaj scivolemuloj iĝos baldaŭ novaj anoj de Esperanto Gironde! Ĉiam estas permesite revii, ĉu ne? Ĝis la venonta jaro!

PS: Mi memorigas vin ke nia asocio oficiale aperas en la retejo de la pesakaj asocioj (<https://assos.pessac.fr/>)

Elvezio

PROKOKOLO DE LA KUNVENO DE ESPERANTO-GIRONDE OKAZINTA EN PESAKO DIMANĈON LA 13AN DE OKTOBRO 2024.

Redaktita de Marcelo

Partoprenis: Elvezio, Eric, Jean-Seb, Klodin', Olivier, Kasper, Dominiko, Marcelo. Tagmeze alvenis Karima.

Senkulpigataj Janine (malsaneta) kaj Yannick, Joel, Rose kaj Bernardo, Gloria (librosalono en Sauveterre-de-Guyenne), Katya, Hervé, kaj Lucas (studanta en Berlino).

La ĉeestantoj aparte salutas Elvezion okaze de lia hodiaŭa naskiĝtago kaj oficiala unua emerita tago... en Svislando! Li plu aktivis en la Bordoza Universitato Bordeaux-Montaigne, kie li plu kunanimas Esperanto-kursojn kun Jean-Seb.



Elvezio malfermas la kunvenon je la 10:45 per **bonaj novaĵoj el la universitato**:

Malfermiĝis la kurso en la universitato. Partoprenas Kasper, kiam eblas al li. Plus Annie, novlernantino el Talence. Ŝi estas emerita. Komencantino. Hervé kaj Jean-François ankaŭ daŭrigas; ili ankaŭ renkontiĝis ĉe la lastmonata rendezuo en Petit-Grain. Ankaŭ ĉeestanta Kasper.

Elvezion kontaktis ankaŭ Nathan Aguire Bengoa, tre bona esperantisto el Perigoza grupo, ekslernanto de Claude Labetaa. Eble vizitos la E-kurson. Studento en Bordeaux-Montaigne pri la hispana.

Kasper¹ prezentas sin en tre bona esperanto. Dukdek jara li venas el Nederlando. Li studas informadikon en Talence ĝis januaro per la Eŭrop-Unia programo Erasmus. Li samtempe plibonigas sian jam tre bonan francan lingvon per FLE. Kaj li bedaŭras, ĉar tiuj kursoj okazas en la sama tempo kiel la Esperantaj. Kasper trovis la Esperanto-Gironde dank' al la reto.

Okazos la Festo de la lingvoj en marto en la *Cité des langues étrangères, du français et des Francophonies*, nova universitata konstruaĵo. La nova direktoro Antoine Ertlé (profesoro pri brita literaturo) tute favoras pri organizo de aparta kunveno kaj prelego, ekzemple invitante Istvan Ertl. Ekzistas dediĉita buĝeto, kiun li malfermos por tiu evento. Elvezio ankaŭ pensas pri ge-Robineau kaj Christian Lavarenne.

¹ Mi sincere bedaŭras, sed mi entute fuŝis la fotitan portreton de Kasper... venontfoje!



Klodin' aldonas la eblon proponi ankaŭ la irlandanon, Seán Ó Riain, kiu kontaktis nin antaŭ kelkaj semajnoj el la irlanda ambasadejo en Varsovio kaj jarfine ekloĝos en Parentis. Bona ideo.

Elvezio donas al ni ankaŭ novaĵojn pri Klemento: li somere portempe laboris ĉe la duno Pilat. Kaj li revidis lin okaze de la Ceremonio por la Master-diplomoj fine de septembro la 27an. Ne Klementon, sed lian koramikinon

Constance el Germanio, Eks-ĝenerala sekretariino de TEJO.

Venos foto publikenda en LEGL.

Pri la **ZAZAtago kaj koncerto de Christian LEDUC: la 8an de decembro je la 15h.**

Marcelo projekcias kaj legas la mesaĝon de la artisto, Christian Leduc, kiun ni invitis por animi nian jarfinan feston. La koncerto okazos en la Pesaka Salle de France - 39 rue Anatole France 33600 Pessac. Elvezio jam rezervis, mankas la ĉekaro, kiun devus porti hodiaŭ Yannick, por la garantio de la rezervado. Ne gravas, temas nur pri senproblema prokrasto. La zorgantoj jam fiksas la daton. Ni kontentiĝos per kvindeko da partoprenontoj sed tiucele necesos nepre informi kaj konvinki kiel eble plej multajn esperantistojn, sed tio ne sufiĉos. Ĉiu el ni ĉirkaŭ si venigu proksimumojn. Ni invitos la kutimajn vizitantojn de tiu kvartala spektaklejo, ankaŭ la bordozajn liberecanojn.

La interkonsentita ideo estas: senpaga eniro, eliro laŭ libervola donaco en ĉapelon.

Pri la sonsistemo, ni devos peti de Christian, ke li mem portu kaj uzu la sian.

Pri la lumoj, Patrick, respondeculo de la spektaklejo, pretas zorgi dum la spektaklo.

Ĉiuj aliaj kondiĉoj por la kontrakto estas validigitaj. Inter kiuj, la helpobezono por instaligo kaj repako de la materialo, la minimuma financa (170€ inkluzive la vojaĝ-kostojn kaj sociajn ŝarĝojn), kaj instalado de butika tablo por disvendo de KD post la spektaklo.

Restas nepre decidote dum nia novembra kunveno: ĉu ni zorgos pri budo por disvendi trinkaĵojn? Kiuj? Kion? Kiom? Tio ebligus iom enspezi kaj instigi viziton-tojn al diskutoj kun la artisto... kaj kun ni por paroli pri Esperanto.

Marcelo rapide preparos afiŝon kaj perrete proponos ĝin kaj informtekston por relegado kaj aprobo.

Dominiko informas pri estonta **Libera festo** kuniganta liberajn monon, programojn kaj lingvon. Projekto pri Libera festo en marto. Kion EG povas proponi? Tablon ĉe budo, por montri librojn kaj disdoni flugfoliojn. Eblas proponi rapidkurson, prezenton de la lingvo per prelego. **Jean-Seb** parolas pri tiaokaza propra sperto:

La Eŭropa himno prezentas plurajn aspektojn de la lingvo (literoj, vortkonstruo, valoro de la poezio, la interna ideo, ktp.) en tre malmulte da tempo eblas multon prezenti kaj fine kanti!

La grupo montras sian interesiĝon kaj atendas konfirmon pri la dato, ĉar ankaŭ la festo de la lingvoj en la universitato okazos en marto. Do ni esperas, ne samtempe.

Dominiko konkludas ke ne certas, ke tiu festo okazos. Ni scios en novembro.

Fine de la kunveno **Dominiko** informas pri malbona sanstato de **Fernando**. Proksimume 68jara, li enhospitaliĝis pro tre grava kancero en la kliniko Bordeaux-Nord. (tie konata kiel Sro Luis Branco). Eblas viziti lin post la 14h en bât. 2, ch. 258.

Katya revenis en Kijivon pasintan sabaton. Ŝi vizitos siajn familianojn kaj geamikojn. Ŝi ankaŭ bezonis iri pro administraj aferoj. Ŝi esperas, ke ŝi povos reveni al ni post proksimume unu monato.

Dum la manĝo, kiel ĉiam tre abunda kaj agrabla, la juna Kasper prezentas al ni la lngvon Toki pona, kiun li lerte praktikas. Ĉu vi neniam aŭdis pri ĝi? Vi maltrafis okazon!

Wikipedia tradukita far Copilot¹: *La toki pona estas minimumista konstruita lingvo inventita de la lingvisto kaj tradukisto Sonja Lang el Kanado, kaj unuafoje publikigita en 2001 interrete. La esprimo "toki pona" kiu nomas la lingvon konstruitan de Lang signifas "la lingvo de bono". La lingvo estas bazita sur la taoista filozofio kaj karakterizas per la ekstrema simpleco de sia fonologio, gramatiko kaj precipe vortprovizo, kio igas ĝin facile lernebla. La toki pona havas 14 fonemojn kaj ĝia vortprovizo origine enhavas nur 120 vortojn. Kiel la simpla angla (basic English), kiu enhavas 850 vortojn, ĝi tamen ofertas relativan esprimecon, dum ĝi estas unu el la plej koncizaj konstruitaj lingvoj.*



https://fr.wikipedia.org/wiki/Toki_pona#:~:text=Le%20toki%20pona%20est%20une,fois%20en%202001%20sur%20Internet.



¹ *Mi estas Copilot, AI-kunulo kreita de Microsoft. Mi ĉi tie por helpi vin en multaj manieroj, babilu kun vi pri ajna temo aŭ simpligi vian vivon! Se vi volas koni pli detalajn informojn pri Bing AI, vi povas viziti la oficialan retejon aŭ resursojn pri tiu specifa servo. Ĉu estas io alia, kion vi ŝatus esplori aŭ diskuti?*

Posttagmeze Marcelo proponas prezenton de la usona kanzono *Sixteen tons* tradukita *Dekses tunoj*. Surprize neniu en la ĉeestantaro memoras, ke li/ŝi iam aŭdis ĝin. Jen do interesa malkovro. Kaj fine, kiel en ĉiu gaŭla aventuro, ni kunkantis!



*** ** * ** * ** *

Post la kunveno Eric, Klodin' kaj Marcelo vizitis la spektaklejon, tiun tagon malfermitan pro etkosta vestaĵdisvendado. Ni estis bonvenigitaj de pluraj respondeculoj, inter kiuj Vincent, help-kasisto, kiu vizitigis al ni la salonon, scenejon, artistejon, kaj la trinkejon... Ili disvendas en ladskatoletojn kokalaon, orangĝosukon, malvarman teon, (2€) kaj bieron (2,50€). Por vin- kaj bier-vendo al publiko necesas peti unutagan licencon al la urbodomo.





Ni klarigis la celon de nia decembra tago. La akcepto estis tre bonkora. Ili informos rekte siajn membrojn per ricevotaj afiŝo kaj prezentoteksteto. La spektaklejo entute konvenos por nia Zaza-tago. La luado (250€) estas etkosta. Patrick konfirmis sian pretecon posttagmeze regi la lumojn dum la spektaklo.

Nia kutima matena kunveno povos senĝene okazi funde de la salono (apud la trinkejo). Ni rajtos kunmanĝi laŭ niaj kutimoj.



Aŭtunaj lumoj

Matenaj palaj sunradioj pene transiras grizajn nebulojn iom post iom stompiĝontaj.

Tagmeze linfine la naturo elmontras sian belan kostumon. Ĝi ja prestiĝe pretiĝas por granda festo, ĉar la rikoltoj jam finiĝis. Do ĉiu planto, ĉiu arbo, ĉiu vito vestiĝas per sia plej belkolora kostumo. Kaj komenciĝas la balo. Vidu la dancantajn branĉojn en la brakoj de la siblanta vento. La folioj swingiĝas tra la aero, kaj post kapturnaj rondoj falas grunden, kovrante la teron per bunta tavolo. Tiel dece senvestiĝas naturo. Vesperaj ombroj etendiĝas pli kaj pli kaj la baldaŭ tute nudaj kampoj kaj arbaroj endormiĝos por longa vintra nokto.



Marcelo

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 10an de novembro 2024
de la 10a 30 ĝis la 16a30



Ceestas: Ĵanseb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Dominiko kaj Geneviève Martins, Olivier Moreno, Klodin' Pomiról, Marcelo Redoulez, Eric Tiffon, Bernardo kaj Rose Sarlandie.

Senkulpigitaj: Joël Lajus,

Elvezio bonvenigas al ĉiuj.

1. Ĉefa afero: preparo de la koncerto de la 8a de decembro

Elvezio: Ni sendis la kontrakton. Ĉio estas en ordo por la rezervado de la salono. Nun ni reklamu por la koncerto

Marcelo: Ni pagu GUSO (aŭtorrajtojn). Tre facile fareble perrete. Devige, ĉar la koncerto estos publika. Ni havas la tutan liston de la kanzonoj. Necesas krei konton por la asocio antaŭ la koncerto.

Yannick zorgos pri la deklaro al SACEM.

Taskoj: - akcepti la kantiston, helpi lin transporti sian materialon. Rendevuo je la 10a

- Instali la seĝojn por la publiko

- Instali tablojn por la kunveno, la librojn, KDojn...

Elvezio: Iu venos por malŝlosi la pordon kaj teknikisto por la lumo, sono, ktp.

En tiu salono troviĝas trinkejo. Estas decidite, ke ni disvendos trinkaĵojn post la koncerto.

Klodin' zorgos pri la aĉeto de la varoj: teo, kafe, sukero, fruktosuko, kirliletoj, kartonaj glasioj

Bernardo kaj Klodin' zorgos pri du boliloj.

Bernardo zorgos pri la ĉapelo, kiu estos prezentata je la fino de la koncerto.

Eric kaj Gloria pretas helpi je la trinkotablo

Yannick zorgos pri la kasfundaĵo.

Bernard kaj Rose ne ĉeestos antaŭ la koncerto.

Marcelo ĉeestos por la akcepto de la artisto kaj

por la reordigo de la salono. Ankaŭ **Yannick, Janine, Hervé, Elvezio**.



La kunveno okazos de la 11a ĝis la 12a. La tagmanĝo okazos nepre je la 12a (por la kantisto).

Bernardo: Se ne-Esperantistoj alvenos, ni povos informi pri Esperanto kaj la Zamenhof-tago.

Marcelo: Estas diversformataj afiŝoj kaj flugfolioj.

Dominiko: Ni anoncu ĉe retejoj, kiaj «On va sortir» ktp, kaj sociaj retejoj. Kaj ni sendu la prezenton al gazetaro.



Marcelo kontaktos La Clé des Ondes.

Elvezio povos zorgi pri la tablo de Espéranto-Gironde.

2. Eŭska renkontiĝo

Dominiko pretas traduki al Esperanto la GPS-informojn. Bezonas iun por korekti.

Marcelo: La propono venis de la Eŭskoj mem. Ili elektis la lokon. Ili proponas por venontsemajna fino renkonton en somerejo inter Vitorio kaj Pamplono. La partoprenantoj mem konstruos la programon: piediro, vizitoj, ktp. Ni ĉiuj estas invititaj. De la origina grupo restas du homoj, Naĉo kaj Rafa; aldoniĝis eksterlandanoj: unu virino el Aŭstralio, kiu instruas la kimran lingvon, kaj germano, kiu vivas en San Sebastian.

Du veturiloj veturos ĝis la kunvenejo (tiu de Marcelo kaj Klodin', kaj tiu de Dominiko kaj Geneviève).

Alia kunveno estas antaŭvidita en printempo en Saint-Palais.

3. La Grajneto

Dominiko: Okazis renkontiĝo en oktobro. Kelkaj homoj partoprenis.

4. Pri Brassens

Marcelo: Devas ĉion refari per «Pages», ĉar ne funkcias per «Affinity». Sed mankas la tempo.

Yannick: Eblas anstataŭigi la fuŝajn paĝojn per la malnovaj el du PDF-oj. Proponas tion fari.

5. Aliaj aferoj

Domingos donas novaĵojn pri Fernando: li estas tre laca.

Marcelo: Temas pri amiko je la fino de sia vivo. Li suferas kaj ne sukcesas trankviliĝi.

Marcelo: Ĉu iu dezirus kontroli la tradukon de *De guerre en guerre* d'Edgar Morin?

Klodin': Novaĵoj pri Katya: hodiaŭ ŝi festas sian naskiĝtagon. Ŝi foriris al Ukraino la 21an de oktobro. Ŝi intencas reveni la 16an de novembro, sed ne scias, ĉu ŝi rajtos: ŝi povus esti rekviziita, kiel apotekistino.

Marcelo: La lasta Sennacia revuo entenas plurajn tekstojn jam publikigitajn en LEGI.

Klodin': Partoprenis en Rochechouart en ceremonio honore al Aristides de Souza Mendes, kadre de festivalo «Foutez-moi la paix». Ĉeestis la nepo de Souza Mendes.

La kunveno finiĝas je la 13a.

Posttagmeze, **Marcelo** prezentas bildaron: «Pri Eŭskio, senŝtata lando».



Janine





EUSKA MONTARO AÛTUNE NOV. 2024

Raporto de Rafa, organizinto

La 16an kaj 17an de novembro okazis en la ekologia kampadejo de Arbizu la aŭtuna renkontiĝo de eŭskaj esperantistoj. Arbizu estas vilaĝo apartenanta al la nafara aŭtonoma komunumo, en areo kie troviĝas la geografia centro de Eŭskio.



Entute 18 esperantistoj ĝuis tiun sperton en vetere agrabla semajnfino. Renkontiĝemaj e-istoj alvenis el Ĝirondio, Arieĝo, Gastejso, Gipusko, Bilbao kaj Nafaro (Alta kaj Malalta). Post bela tagmanĝo la partoprenantoj piedmigris ĝis sundeklivo tra la montaro Andia, kaj post vespermanĝi, plenuminte e-an tradicion, je la deka vespere okazis trankvila sed tamen suka gufuja sesio en kabano, provizita per prezento de tokipona lingvo, libro pri G. Brassens, lerneja projekto en Afriko, kunkantado, spritaĵoj ktp. Infuzaĵoj kaj kukoj dolĉe frande kompletigis tiun programeron.

Dimanĉe matene ni iris aŭte al najbara vilaĝo Etxarri Aranatz. Tie ekas rava arba itinero, kie abundas centjaraj imponaj kverkoj. Post tiu belega piedirado, ni piknikis en kapela parko en Etxarri, kaj fine la partoprenantoj revenis al siaj hejmoj.



Etoso dum la tuta renkontiĝo estis ĉarma kaj vigla, la ĉeestantoj interesiĝis pri la venonta printempa renkontiĝo. Ĝi okazos meze de majo 2025 en Donapaleo (Norda Eŭskio/Malalta Nafaro). Ĝis tiam.

Marcelo: Najbaraj esperantistoj invitis nin

Eŭska Montaro Aŭtune **Ĝojanima semajnfino en Arbizuo** la 16an kaj 17an de novembro 2024



Dekokope kuniĝis geesperantistoj en la kampadejo de Arbizuo, navara vilaĝo situanta proksime al Pamplomo. La ideo revigligi la ĝemeliĝon inter Esperanto-Gironde kaj la Eŭska Esperanto-Asocio iel impulsis tiun alvokon. Kaj kun granda plezuro ni retrovis Rafa, Natxo, Xavi kaj Niko, kiuj same varme memoras la SAT-Amikaran kongreson en Artigo en 1992 kaj la postan Eŭskan Montaran Aventuron, kiam SAT-gejunuloj somerumis tutan semajnon ĝuste en tiu sama valo, kie ni troviĝis ĉi-novembre.

El Ĝirondio partoprenis Dominiko (ĉemane vundita) kaj Geneviève, kiuj kunveturigis Casper, kaj Klodin' kun Marcelo. Internacian etoson aldonis la partoprenon de Deborah, aŭstralino, loĝanta nuntempe en Gaztejsa kaj Dominik, germano loĝanta en Donostio (San-Sebastiano).



Sabaton (16/11/24) ni ĝuis belan veteron, spite al malfavoraj prognozroj, kaj ni povis agrable promeni sur la monto super la valo. Tie en la ĉielo regas

vulturoj. Granda rabobirdaro flugadis super niaj kapoj. La profunda valo en la vesperiĝanta lumo vestis sin per belegaj koloroj.

Dum nia novembra grupkunveno en Pesako ni (re)malkovris la gravecon de la monaĥo Bernat Eĉepare kaj legis "*Eliras la eŭska al sun'*" lian poemon el la unua libro verkita en 1545 kaj presita en Bordojo. Ĝin muzikigis N. Defelipe kaj famigis Mikel Laboa en la 20a jarcento. Renato Corseti tradukis ĝin en Esperanton kaj Marĉela Fasani registris kaj famigis ĝin tra Esperantio. Tiun kanzonon ni kompreneble rekantis kun la eŭska grupo en la *gufujo* sabaton vespere.

Kio estas *gufujo*? Gufo estas noktobirdo distingebla de la strigoj dank' al ĝiaj plumoj starantaj ambaŭflanke de la kapo, simile al oreloj. Ĉi-apuda bela pentraĵo kovris tutan muron de la



akceptejo. Esperantistoj nomas *gufujo* rendevuejon por noktemuloj, kiuj deziras diskuti, ŝerci, kanti. Tamen ne konfuzu kun diboĉejo gufujon. Tie ne eblas trinki alkoholon. Nur kafon, teon kaj senalkoholajn trinkaĵojn. Dum EMA la kabano de la invitintoj, Rafa, Natxo kaj Xavi iĝis gufujo ĝis duono post noktomezo. Tiam ni ĝuis aparte bongustan teon kunportitan kaj preparitan de Casper. Dankon al li. Rafa kiel animanto disdonis parolvicojn: i.a. Evelyne prezentis agadojn favore al Esperanto en Afriko, Natxo, ciuzanto, ridigis nin per legado de vortluda teksto de Stefan MacGill pri "Vi kaj ci". Marcelo prezentis la Brasensan kantaron kaj Klodin' kolektis aliĝojn de kvar novaj Kompanoj 🍌. Kaj kompreneble ni kunkantis en esperanto eŭskajn kanzonojn *Eliras la eŭska al sun'* kaj *Birdeca bird'*, sed ankaŭ alidevenajn, dank' al tekstoj kolektitaj kaj senpage legeblaj ĉe KantarViki: <https://kantaro.ikso.net>.



Dimanĉon matene nebulo envolvis la tutan valon. Sed ĝi iom post iom forvaporigis. Kaj je la 11h, kiam ekstartis la promenado, sunradioj jam malavare lumigis la arbaron. Aŭtuna arbaro orbrilas, ravas la okulojn kaj la paŝado tra la falintaj sekaj folioj ritmigas la iradon.



La grupo trankvilpaŝe promenis ĝis la kapelo de Sankta-Adrian (*sur la foto*). Tri kilometrojn ire plus... tri revene. Tempo por pliaj diskutoj, interŝanĝo de ideoj, de vivspertoj kaj aliaj temoj, ĉar tiaj renkontiĝoj ne nur ebligas praktiki esperanton kaj tiel vigligi la movadon. Ili ebligas rektajn homajn senperajn kontaktojn en la difino mem de la *Interna Ideo* de Oĉjo Zaza.

Marie invitas nin por samtipa eŭska semajnfino venontprintempe. Ĝi okazos norde de la Pirenea ĉeno :

en Donapaleo (St-Palais) la 17an kaj 18an de majo 2025.

Nepre ne maltrafu tiun rendevuon: jam notu ĝin sur vian agendon!



Eliras la eŭska al sun'

Rekantaĵo

Etai lelori bailelo leloa zarai leloa'
Eliras la eŭska al sun',
pro tio ĝoje ni dancu en kun'.



Jen la eŭska lingvo ekmarŝanta el urb' garazi'
tie ĝia rang' estas ver' ne fantazi'.
Se ĝis nun inter ĉiuj lingvoj estis ĝi ĵargon',
nune male sub la suno brilos ĝia glorbiton'.

Rekantaĵo

Bone pritaksita estis eŭsk' en ĉiu lok',
sed al lia lingvo ade venis nura mok',
Eble ĉar neniam ĝi uzatis en presej',
sed mokantoj nun ekvidos ke ĝi belas, belas plej.

Rekantaĵo

Ĉiu eŭsko povas nun paroli kun orgojl',
ĉar la lingvo patra estas ĉe la famosojl',
kaj por princoj kaj por kleraj uloj gramatik'
estas nun pristudobjekto, inda, deca, sen kritik'.

Rekantaĵo

Kaj ĉi tion ŝuldas ni al garazia¹ hom',
hom' bordoa² ema je ĉi tiu idiom',
de la eŭska restos li unua la presist',
ni lin danku ĉar kun li ekstaris eŭska libr-ekzist'.

etai lelori bailelo leloa zarai leloa'
eliras la eŭska al sun',
pro tio ĝoje ni dancu en kun'



¹ Garazia = el urbo Donibane-Garazi = St-Jean-Pied-de-Port

² Bordoa = el Bordo' (= Bordoza)

Kiu estis Bernat Etxepare?

Bernat Etxepare (ankaŭ konata kiel Bernard d'Etchepare) estis eŭska presisto kaj verkisto, naskita ĉirkaŭ 1480 en Bussunarits-Sarrasquette, en Basse-Navarre, kaj mortinta en 1545. Li estas plej konata pro sia verko "**Linguae Vasconum Primitiæ**", kiu estis la unua libro publikigita en la eŭska lingvo en **1545**.



Linguae Vasconum Primitiæ (signifanta "Unuaj Fruktoj de la Eŭska Lingvo") estas kolekto de poemoj kaj prozaĵoj, kiu celis konservi kaj disvastigi la eŭskan lingvon kaj kulturon. La publikigo de tiu libro estis grava momenta en la historio de la eŭska lingvo, ĉar ĝi helpis konservi kaj rekomenci la uzadon de la lingvo post jaroj de subpremo.

Bernat Etxepare estis ankaŭ vikario en Donibane-Garazi kaj rektoro en Eihalarar en 1518. Li estis aktiva dum la regado de Johano la 2-a de Albret, kiu batalis por reakiri la urbon Donibane-Garazi de la hispana okupado.

Bernat Etxepare estas agnoskita kiel pioniro en la konservado kaj disvastigo de la eŭska lingvo, kaj liaj kontribuoj restas gravaj por la eŭska kulturo kaj identeco.




La Grupo Entre-2-Mers Esperanto partoprenis en la 5a Virtuala Kongreso de UEA!



De la 28a ĝis la 31a de novembro okazis la 5a Virtuala Kongreso de UEA. Virtuala? Fakte reala sed perreta. Dum tiun kvar diurnoj senĉese esperantistoj en ĉiuj horzonoj povis retumis kaj tiel sekvi diverstemajn prelegojn en klasĉambroj aŭ debati aŭ partopreni asociajn "kunvenojn". Ankaŭ eblis viziti la "kafejon" aŭ hazarde renkonti iujn en la koridoro. Tiam la konversacioj okazas kiel dum ĉeestantaj kongresoj. Ĉiu alvenanto estas bonvena kaj post prezento partoprenas en la diskuto.

Sabaton la 30an okazis E-kurso en St-Genès-de-Lombaud. Tiam Iberla, Thibaud, Jean-François gastigis Vincent, Katya, Klodin' kaj Marcelo. Ni daŭre retrovis la malaperintan Gerdan, sed post la leciono ni aliri al la kafejo de VK. Tie ni renkontis Karel Votoček el Ĉeĥio, kiu diskutis kun juna Indoneziano nuntempe studante en Tajvano. Ĉe ĉi-lastata estis la 19:00 dum ĉeni tagemeze! Dum 10 minutoj okazis kelkaj interŝanĝoj kaj la novgelernantoj spertis siajn unuajn internaciajn rektajn kontaktojn! Bele ĝoja emocio!

La antaŭan tagon el nia hejmo, ni unuan fojon renkontis la ĉeĥon Karel, kaj ankaŭ diskutis kun niaj koreaj



geamikoj el Seulo S-ro KANG Hon-gu (kiun geesperantistoj kromnomas Kanguruo) kaj S-rino PARK Haesim (kiu lastjare sendis al ni poemon okaze de la Printempo de la poetoj). Kaj rapide ankaŭ partoprenis Mariko Aishima, japanino, kiu loĝas en Hamburgo. Ni kun granda plezuro revidis ŝin, kiu vizitis nian hejmon per Pasporta Servo antaŭ eble dek kvin jaroj. Laste partoprenis iu Frances, novlernanto kaj nur aŭskultanto.

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO EN PESSAC ZAMENHOF-TAGO
SALLE DE FRANCE, Rue Anatole France
La 8an de decembro 2024 de la 11a ĝis la 17a

Ceestas: Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Katya Gadzion, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Joël Lajus, Olivier Moreno, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Jean-François Seylier, Eric Tiffon. Bernardo kaj Rose Sarlandie alvenos posttagmeze.

Elvezio bonvenigas ĉiujn kaj deziras bonan Zamenhof-feston.

Klodin': Ni lasis 4 ekzemplerojn de Brassens en Eŭskio.

Elvezio bezonos kelkajn por la 3a de aprilo, Festo de la lingvoj. Kontaktis Sean.

La venonta kunveno estos por la reĝkuk-festo.

Klodin': Katya trapasis la ekzamenon pri la franca, kaj sukcesis la nivelon B2.

Ĉiuj gratulas ŝin kaj ĝojas, ke ŝi estas denove kun ni.

Yannick pagis 55 € por la SACEM.

Eric: 4 personoj partoprenis en la pasinta kunveno en Le Petit Grain. La venonta kunveno okazos la 19an de decembro.

Klodin': Esperantisto el Dubaj skribis, ke li havas familianon, kiu dezirus veni en Bordozon en decembro por du tagoj inter la 15a kaj la 29a. Ĉu iu bonvolus gastigi lin ?

Elvezio: Venis ankaŭ peto de kubano (Miguel Angel).

Marcelo: Virtuala kongreso de UEA okazis antaŭ kelkaj tagoj. Okazis multaj prelegoj (registritaj kaj videblaj ĝis fine de decembro), diskutoj laŭtemaj (ne registritaj), babilejoj. Li renkontis seulajn geamikojn, ĉeĥon, japaninon, kiu loĝas en Germanio... La programo estis tre varia.



Tiajn renkontiĝojn UEA organizis pro la epidemio, kaj ili tiel bone funkciis, ke UEA decidis, ke iu virtuala kongreso okazu ĉiujare, fine de novembro-komence de decembro. Tio estas la kvina. Tio estas okazo praktiki kaj revidi geamikojn.

La venonta UK okazos en Brno.

Klodin': Dominiko, Geneviève, Kasper, Klodin' kaj Marcelo ĉeestis la eŭskan renkontiĝon (vidu raporton p.18). Dekoko da homoj partoprenis. La aŭtuna vetero estis tre agrabla.



Marcelo: Estis tre agrable, ni ĝuis la aŭtunajn pejzaĝojn. En la vespero okazis «gufrenkontiĝo». La etoso estis tre ĝoja. Diversaj babiloj, prezentoj. Je noktomezo la gufo kantis kaj ni ĉiuj iris por enlitiĝi. Tre belaj promenadoj en la montaro, en arbaroj. Revidis amikon, Niko, post pli ol 30 jaroj. La ĉefaj organizantoj estis Naĉo (oficisto en regiona parlamento) kaj Rafa (kiu instruis la eŭskan lingvon antaŭ ol emeriti). Tio okazis en kampadejo. Ĉiuj estis gastigitaj en lignaj dometoj tre belaj. Kasper estos libera la 5an aŭ la 11an de januaro (venonta kunveno).

Yannick a fait la demande auprès de la SACEM: devra donner la liste des titres après le concert, avec leur durée. Le coût de la SACEM dépend de l'organisation: frais engagés, prix des places, prix des boissons. En ce qui concerne le GUSO, Christian dit qu'il n'en a pas besoin.

Marcelo ne ricevis novan prezotakson de la presisto. La 11an de januaro, Marcelo prezentos la kanzonon *Libera pens'* honore al Charlie Hebdo.

Fino de la kunveno je la 12a.

Venontaj kunvenoj:

- sabaton 11an de januaro 2025: Maison de quartier de Cap de Bos, 39 rue des Provinces, Pessac (reĝkuko)
- dimanĉon 16an de februaro 2025: Salle du Bourg (nia kutima kunvenejo)
- dimanĉon 23an de marto: Salle du Bourg (Ĝenerala asembleo kaj la Printempo de la poetoj)

Post la manĝo, okazas la koncerto de Christian Leduc.







Die Gedanken sind frei
Libera la pens'
La liberté de penser



La kanzono "*Die Gedanken sind frei*" (*Libera la pens'*) estas germana popolkanto pri la libero de pensoj. Dum la originala teksto verŝajne estis verkita antaŭ 1800, nunaj adaptaj devenas de la versio kreita en 1842 fare de August Heinrich Hoffmann von Fallersleben.

Origino

La originala teksto estis unue publikigita en broŝuro ĉirkaŭ 1780. Ĝi aperis sur flugfolio en la kolekto de Achim von Arnim "*Sieben sehr schöne Neue Lieder*" (*Sep tre belaj novaj kantoj*) (ĉirkaŭ 1800). La melodio estis verkita inter 1810 kaj 1820. En 1842, la kanto estis publikigita en "*Schlesische Volkslieder*" de Hoffmann von Fallersleben kaj Ernst Heinrich Leopold Richter. La centra temo de la kantoteksto troviĝas jam en la 13-a jarcento, inter aliaj ĉe Freidank (*Modestie*, 1229) kaj Walther von der Vogelweide (*Joch sint iedoch gedanke frī – Ja la pensoj estas liberaj*).

Malpermeso


Post la konferenco de Carlsbad, renkonto inter Prusaj kaj Aŭstraj regnestroj, en la epoko de Metternich, estis publikigitaj la 20a de septembro 1819 serio da dekretoj, kiuj i.a. celas kontraŭi la libertendencajn ideojn, kiuj etendiĝas tra la germana konfederacio. Tiam "*Die Gedanken sind frei*" estas populara protestkanto kontraŭ politika subpremo kaj cenzuro, precipe inter la studentoj, universitatoj kaj la malpermesitaj "frataroj" (i.a. framasoj). Post la malsukceso de la germana Marta revolucio en 1848, - ribelo kontraŭ la subpremo de Aŭstrio kaj Prusujo kaj sopiro al unueco de Germanio, - la kanto estis malpermesita.



En tiu senco, ĝi estis populara ĉe germanaj rezistgrupoj ankaŭ dum la nazia reĝimo. En 1942, Sophie Scholl, membro de la rezista grupo Blanka Rozo, ludis la kanton per sia fluto antaŭ la muroj de la malliberejo en Ulm, kie ŝia patro Robert estis malliberigita pro nomado de Adolf Hitler "la plago de Dio". Pli frue, en 1935, la gardistoj de la koncentrejo Lichtenburg ordonis al la malliberuloj organizi spektaklon por la 46-a datreveno de Hitler; la malliberigita advokato Hans Litten tiam recitis "*Die Gedanken sind frei*".

Muzikigo

La teksto estas uzata en la kanta ciklo "*Des Knaben Wunderhorn*" (1898) de Gustav Mahler en la 8-a kanto: "*Lied des Verfolgten im Turm*" (Kanto de la persekutitoj en la turo), en kiu malliberulo kaj virino kantas dueton. Ĉiu strofo kantita de la baritono estas sekvata de sekcio de kvin linioj kantita de la virino (soprano). La teksto kantita de la baritono diferencas de la teksto de la pli frua versio antaŭ 1865 prezentita ĉi-sube:



- La unua strofo estas la sama.
- La dua strofo estis parte uzita de Mahler en sia tria strofo.
- La tria strofo estis muzikigita de Mahler kiel la dua strofo.
- En la kvara strofo, Mahler uzis kelkajn partojn de la strofoj 4 kaj 5 de la versio antaŭ 1865.



Laŭvorta traduko de la teksto

La pensoj estas liberaj, sed kiu povas ilin diveni? Ili flugas kiel noktaj ombroj. Neniu povas koni ilin, neniu ĉasisto povas pafi ilin. La fakto restas: la pensoj estas liberaj.

Mi pensas pri tio, kion mi volas kaj kio min ĝojigas, sed ĉion en silento kaj laŭ konvena maniero. Miajn deziron

kaj sopiron neniu povas nei. La fakto restas: la pensoj estas liberaj.

Mi ŝatas la vinon, Mian knabinon antaŭ ĉio, Ŝin mi amas plej bone. Mi ne sidas sola kun glaso da vino, mia amatino kun mi: miaj pensoj estas liberaj.

Kaj se ili enŝlosos min en malluma karcero, ĉio tio estos nur vana; Ĉar miaj pensoj rompos la barilojn kaj la murojn: la pensoj estas liberaj. Nun mi volas rezigni pri zorgoj por ĉiam kaj mi ne volas plu ĝeni min per la kradoj. Oni povas ĉiam ridi kaj ŝerci en sia koro kaj pensi: la pensoj estas liberaj.

Ĉiam aktuala, en januaro 2015, alzacaj artistoj mobiliziĝis “por ne forgesi Charlie”.

Ili ne povis silenti antaŭ la nenomeblo. En Alzaco, 130 artistoj volis registri kanton honore al Charlie-Hebdo kaj al la viktimoj de la atakoj en Parizo. Ili kvazaŭ nature elektis kiel himnon “Die Gedanken sind frei”, simbolon de Libereco.



Kiel milionoj da Francaj homoj, ili spertis la ŝokon de la atakoj en Parizo. Ankaŭ bildojn de malamo, sango, kaj reage, frateco. Ĝuste por alten levi la valorojn, kiuj estas al ili kare necesaj, la kolektivo “Por ne forgesi Charlie” decidis aŭdigi sian voĉon. La projekto, gvidita de tri artistoj el Alzaco - Jean-Pierre Schlagg, Roger Siffer kaj Michel Reverdy - estis aranĝita en kelkaj tagoj. Kaj la reago de la kultura medio en la regiono rapide kunmobiliziĝis: pli ol cent homoj - kantistoj, muzikistoj, humoristoj, teknikistoj - deziris partopreni en tiu amdeklaro al Libereco.

Himno por esprimlibero

La kanto mem trudis sin: *Libera la pens'* evidentiĝis kiel ekzemplo de rezisto kontraŭ subpremo. Ĝi estas interpretita en pluraj lingvoj (alzaca, franca, germana, araba, itala, turka, jida, angla, kreola...) kaj estis registrita en la aŭditorio de France 3 Alzaco vendredon la 16-an de januaro 2015, naŭ tagojn post la murdado ĉe Charlie-Hebdo. France 3 elsendis la filmeton la unuan fojon lundon tri tagojn poste, la 19-an de januaro 2015 dum la vespera TV-ĵurnalo 19/20.

Kantu en la germana kaj en la franca !

Die Gedanken sind frei,
wer kann sie erraten
sie fliegen vorbei
wie nächtliche Schatten.
Kein Mensch kann sie wissen,
kein Jäger erschießen
mit Pulver und Blei.
Die Gedanken sind frei

Ich denke was ich will
Und was mich beglückt,
Das will ich nicht
Und wie es sich schicket.
Mein Wunsch und Begehren
Kann niemand verwehren.
Es bleibt dabei:
Die Gedanken sind frei.

Im finstern Kerker,
Das alles sind rein
Vergebliche Werke;
Denn meine Gedanken
Zerreißen die Schranken
Und Mauern entzwei:
Die Gedanken sind frei.

Elles sont libres les pensées,
personne ne peut les arrêter.
Les pensées peuvent s'envoler
comme une ombre dans l'obscurité.
Aucun homme ne peut les deviner,
aucun chasseur les tuer,
Aucun fusil assassiner
la liberté de penser.

Je pense ce que je veux
C'est ce qui rend heureux
Je le fais en silence
A ma convenance
Mon désir, ma volonté
Personne ne peut les réfuter
C'est ma réalité
la liberté de penser

Et si l'on me jette
Dans un cachot profond
Toujours il me reste
Ma vérité au fond
Aucun mur ne peut lui résister
Aucune frontière l'arrêter
C'est ma réalité
la liberté de penser

la liberté de penser
die Gedanken sind frei

Kantu en esperanto!

Mi ne trovis informojn pri la tradukinto, B. Klatil. Tre verŝajne germano, kiu adaptis ĝin en esperanto antaŭ ol ĝi estis tradukita en la francan. Rilate la tradukojn, vi tuj konstatis, ke nur tri strofoj estas en la franca kaj kvar en esperanto. Malaparis la meza strofo kantanta la vinon kaj la amon al la knabino... ĉu tro malserioza afero ?

Libera la pens'

La penso de la hom'
Libera ja estas
Samkiel fantom'
Kaŝita ĝi restas
Ĝin hom' ne divenos,
Nek ĉirkaŭkatenos,
Do restas laŭ senc',
Ke libera la pens'!

Mi pensas laŭ plezur'
Nenie ĝin citas,
Sekrete mi nur
Pri ĉio meditas.
Dezirojn – vi sciu –
Malhelpas neniu,
Do restu laŭ senc',
Ke libera la pens'!

Se iam kaptos min
Karcero malhela,
Deklaros mi ĝin
Agado sencela:
La pensoj trapasos,
La murojn frakasos
Per granda potenc'
Ĉar libera la pens'!

Do tial nun ĉe fin'
Mi zorgojn forpelas;
Turmentas ili min,
Vivĝojon forŝtelas.
Mi povas sentime
Ĝojadi anime
Kaj pensi de
komenc':
Ja libera la pens' !
Kaj pensi de
komenc':
Ja libera la pens'!



Informoj kaj originalaj versioj el la germanlingva retejo:

<https://www.gedichte7.de/die-gedanken-sind-frei.html#:~:text=Verbot,1848%20wurde%20das%20Lied%20verboten.>

Kaj el tiu de France-TV-Info :

https://www.francetvinfo.fr/culture/musique/clip-les-artistes-alsaciens-se-mobilisent-pour-ne-pas-oublier-charlie_3332411.html

Adiaŭ Fernando!

Nia kara kamarado Fernando Torres forpasis dimanĉon la 29an de decembro. Kiam li venis en Cenon por unuafoje renkonti nin, li forte sopiris praktiki Esperanton, kiun li eklernis perrete. Li tuj parolis pri sia amiko Dominiko, kiu ne povis veni ĉar lunde posttagmeze li laboris.

Jam de tiu unua kontakto Fernando sukcesis montri sian malferman kaj afablan personecon kaj komprenigis, ke kelkaj vortoj

sufiĉas por krei fortajn ligojn. Li tre bedaŭris la mankon de parolaj kursoj en Bordoza, kaj despli bedaŭris nesufiĉe regule viziti niajn monatajn grupkunvenojn. Tamen, lia ĉeesto, ĉiam estis tre pozitiva, kiel li mem. Ni ne forgesos lian aktivan partoprenon en nia *Printempo de la poetoj* lastan marton. Tiam kun Dominiko li interpretis la portugalan rezistokanton *Grândola Vila Morena*, *Grandula urbeto bruna* tradukita de Jorge Kamaĉo. Neniu el ni tiam povis imagi tiel rapidan vivofinon.

En junio Fernando grave helpis nin por perfektigi nian prezenton de Aristides de Sousa Mendes por la Oporta SAT-kongreso. Li invitis nin en sia hejmo por renkonti lian edzinon Ana, sekretariino de la bordoza Komitato memore al la portugala konsulo, savinto de miloj da fuĝintoj en 1940. Li tiam ankoraŭ ne konfesis senton de malforto, kaj nek ĉagrenis ne plu povi plenaere ĝardenumi ĉe sia filo en Camblanes, kiel li diris en septembro.

Jam fine de la somero, la sanstato de Fernando grave malboniĝis. Liaj lastaj semajnoj en la norda hospitalo de Bordoza, povis helpi lin nur per malpliigo de la suferoj.

Nia grupo ĵus perdis radiantan kompanon, kiu per sia simpleco kapablis naski profundan respekton.

Li laste festis sian 68an jaron la 28an de novembro.

Ĉagrene,

Marcelo kaj Klodin'



Fernando kun Dominiko por la Printempo de la Poetoj, la 10an de marto 2024

Evelyne kaj JP de la Sunkompanio el Arieĝo informas nin:



Feliĉaj gelernantoj en aparta lernejo : Instituto Zamenhof !

Temas pri mirinda sperto, ĉar ni ne povas imagi tian realigaĵon en tiu-ĉi malriĉa kvartalo de Lome, ĉefurbo de TOGOLANDO.

Jam tri foje ni vizitis tiun-ĉi lernejon, la unuan fojon en 2004 tuj post kiam la konstruaĵo estis finkonstruata. Tuj evidentiĝis la sukceso de la propono, kaj hodiaŭ jen 429 gelernantoj ĉiutage vizitas IZon (Instituto Zamenhof).

Ja, vi bone komprenis, temas pri lernejo, kie Esperanto, kiel nedeviga lernobjekto estas proponata al ĉiuj lernantoj de la dua nivelo (mezlernejo).

Kreita de la Esperanta teamo de Lome, la lernejo naskiĝis dank' al la malavareco de Nederlandanoj, la amikeco inter Hans Bakker kaj Koffi Gbeglo kaj la senĉesa aktivado de ĉiuj zorgantoj.

Krom la deviga ŝtata instruo, la lernejo celas proponi al ĉiuj geknaboj de la kvartalo, kaj ĉefe al knabinoj, bonnivelan instruadon, kursojn pri informadiko, kudradon, Esperanton, kaj nociojn pri nutraĵo, higieno...

La tieaj Esperantistoj volonte disponigas du komfortajn dormoĉambrojn por Esperantistoj, kiuj deziras ĝui la viglan etoson de la lernejo. Kompreneble, vi devas akcepti fruan vekigaĵon, laŭ la ritmo de tamburoj

kaj kantoj, sed vi neniam forgesos la multnombrajn « saluton! » de la scivolemaj infanoj, la senlimajn babiladojn kun la geinstruistoj, la ĝojon traflugantan trans la klasmuroj.

Kaj pri ni ? Ni loĝas sude de Francio, en bela montaro Pireneoj, kie ni proponas feriojn por infanoj dezirante malkovri nian farmbienon kaj ĝiajn bestojn, naturon, kamparan vilaĝeton, aŭdi pri Esperanto... Post nia unua vizito al IZo, ni decidis krei asocion, kiu titolas « Une Ecole au Togo » same kiel tiu de Hans Bakker « Een school en Togo » en Nederlando. Ni kunigis kelkajn geamikojn, decidis, kiam infanoj ferias ĉe ni, ŝpari po 1€ tage/infane, kaj tiel partoprenas la lernejkoston de la lernantoj: ni neniam bedaŭris vidante la ridetojn sur la vizaĝoj de la infanoj !

Ne hezitu, nepre vizitu ilin, ili atendas vin !



Jen nia adreso:

**Une Ecole au TOGO
09800 ARROUT
FRANCE
Tel : + 33 6.95.53.51.75
sunkompanio@wanadoo.fr**

Jen en Togolando:

**GBEGLO Koffi, B. P. 13169, Lome,
TOGOLANDO
TEL: - Oficejo (IZo): (228) 227 51 64
(228) 271 47 12
(228) 27115 57
Poŝtelefono :(228) 928 16 26
E-poŝto : esp.togo@cafe.tg**

Blogo : <http://uneecoleautogo.jimdo.com>

**Bonvolu noti ke la asocio Une Ecole au Togo
akceptos vian monpartoprenon kun granda ĝojo!
Sufiĉas kontakti nin, ni klarigos ĉion!
Plie vi ricevos atestilon por impostredukto...**

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

